

Leterkesto-Norbert-Merkens.

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1990 novembro 01.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo90-23/SRI-1990-23-A-3-Claude-kaj-Andree-Gacond-Leterkesto-Norbert-Merkens.mp3>

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond nome de Svisa Radio Internacia.

Ni daŭrigas nian konversacion kun la geaŭdantoj, kiuj skribis. Kaj ni multe dankas al ĉiuj, kies mesaĝoj aŭ raportoj plenigas nian leterujon.

A.- Ni ricevis 9 aŭdraportojn de Norbert MERKENS en Wuppertal, Germanio. Li skribis:

La prezentado de la "Zamenhofa Ekzemplaro" kompilita de Rihej Nomura en Japanio atentigis min pri la graveco kaj neceseco de tia verko inter esperantistoj. Ĝi povas esti stilformiga literaturaĵo. Kie ĝi estas havebla, mi forgesis.

Cl.- Ĝi devus esti aĉetebla en ĉiu libro-servo normale funkcianta. En Svislando ĉe la libroservo de Kultura Centro Esperantista ĝi kostas 122 frankojn svisajn.

A.- Koncerne la leterkeston Norbert MERKENS skribas :

Cl.- La mencio kaj respondo je ĉiuj viaj aŭskultintoj estas simpatia maniero por teni la kontakton al la "skribuloj". Estas bele scii, ke niaj reagoj tiom atenteme estas legataj.

A.- Nian konversacion kun la juna brito [Martin MORRIS](#), kiu helpis en Kultura Centro Esperantista por la tajpado de esperantigo de verko de Edmond Privat provante samtempe elpeli francismojn, altiris la atenton de Norbert MERKENS.

Cl.- En via hodiaŭa intervjuo kun Martin MORRIS vi tuŝis tre gravan problemon de neidenteco de vortoj kun nocioj. Ekzemple mi lernis en germana lernolibro, ke *kontraŭ* egalas *gegen*. Tial mi miris, ke pola radio ofte uzis kontraŭ kun akuzativo, ĝis mi serĉis en PIV, kaj trovis alian signifon, kiu egalas al *gegenüber*, tion mi estus esprimanta per *vidalvide de* sed ne per *kontraŭ*. Kiel nu sentas francoj, italoj ktp ĉe la vorto kontraŭ. Kiu - cetere- difinas la "plenan" sencon de vorto? de kie ĝi ricevas la pravigon? en naciaj lingvoj per la uzo de la vortoj en ĉiutaga vivo ricevas vorto sian profilon. En Esperanto bedaŭrinde ne tiom simple eblas.

A.- Tiu rimarko kaj demando de Norbert MERKENS indus tre detalan respondon fare de lingvisto. En leterkesta elsendo kun mallongaj respondoj ni povos nur skize respondi.

Cl.- Unue mi ŝatus atentigi niajn aŭskultantojn, ke ne ĝustas diri, ke en la naciaj lingvoj vortoj ricevas sian profilon per la uzo en la ĉiutaga vivo. Povas esti, ke tiel pli malpli estas en la germana lingvo. Sed en la franca lingvo certe ankaŭ intervenas aliaj dimensioj, inter kiuj ĉefas la aŭtoritato de vortar-eldonejoj. Esperanton endanĝerigas la granda proporcio de mezkapablaj lingvopraktikantoj, kiuj baraktas kun lingvoproblemoj ofte fontantaj el supraĵaj klarigoj lernolibraj. Tiurilate la ekzemplo de Norbert MERKENS pri la prepozicio kontraŭ estas ege instrua. Li lernis nur unu el la uzoj de kontraŭ identigante la vorton al la germanlingva

prepozicio gegen, kaj nur per la konsulto de PIV li malkovras aliajn uzojn, kiujn oni ne povas traduki per la germana prepozicio gegen. Tiel tutcerte ne nur estas por ĉiuj prepozicioj, sed ankaŭ por ĉiuj vortelementoj. Esperanto forĝis al si propran semantikon, kiun oni povas nur dedukti el la ekzemploj, kiujn Plena Ilustrita Vortaro modele listigas kaj el la atenta tralego ne nur de la zamenhofaj verkoj, sed ankaŭ de tiuj de verkistoj, kies renomo estas plej multe laŭdata. Tiu laŭdado ofte ne koncernas la enhavon mem de la laŭdataj verkoj, sed la koncernan lingvouzon. La esperantistaro lingve identiĝas pli al Julio BAGHY, ol al Kolonamo KALOCSAY, kaj nuntempe en esperantujo oni pli aprezas Claude PIRON, ol Karolon PIĈ. La lingvo-uzo de BAGHY kaj de PIRON verŝajne pli kongruas kun la ĝenerala normo. KALOCSAY, kiel nun PIĈ, estas eksternormuloj. Tio ne malhelpas ilin esti beletre pli gravaj ol BAGHY kaj PIRON, kies rolo tre verŝajne estas pli lingva, ol literatura. Tial la atenta trastudo de la lingvaĵo de ZAMENHOF, PRIVAT, BAGHY, PIRON, helpas al la akiro de la signifaro de la vortoj. Kontraŭe la verkoj de KALOC5AY, de DE DIEGO, de HAUPENTHAL, pro sia naturalismo, de PIĈ pro sia aŭtonomismemo, de MIMOO kaj de Rikardo ŜULCO pro sia logikema skemismo, de André ALBAULT pro sia etimologismo, ne helpas la esperantistojn. Por ilin aprezi, oni devas jam unue bone regi la lingvon, ne havi tro da hezitoj pri la signifaro de la vortelementoj. Mia konsilo estas do, fidu pli je PIV, ol je Plena Analiza Gramatiko, pli je la verkistoj ĝenerale ŝatataj, ol je tiuj, kiuj predikas specialan lingvo-uzon. Kaj antaŭ ĉio liberiĝu de la pertraduka kompreno de vorto. Por bone kompreni la signifaron de vortelemento, plej bone estas la listigo de frazoj, en kiuj ili rolis. En PIV la ekzemplaro pri la prepozicio kontraŭ plenigas preskaŭ tutan paĝon. Esperanto-progresantoj, antaŭ ol debati pri la ekzakteco aŭ ne, de aŭdita uzo, ĉiam devus tre atente trastudi tian ekzemplaron, kiu registras ĉiujn eblajn rolojn. Tiurilate Gaston WARINGHIEN verkis la plej taŭgan lernolibron por progresantoj.

A.- J. KARHAN en Olomouc, Ĉeĥoslovakio bedaŭras, ke nia pasinta radio-saluto aŭdigis, kiam bedaŭrinde li ne estis hejme por nin aŭskulti.

Cl.- Ni esperas, ke ĉi-foje li estas hejme.

A.- Karl-Heinz KERSTING en Essen, Germanio, salutis el Linz, Aŭstrio, okaze de la SAT-Kongreso.

Cl.- Saluton al Robert KOEHLER en Vestavia Hills, Usono.

A.- Al Gertraud KNORR en Gera, Germanio

Cl.- 5 mesaĝojn kun akompanaj dokumentoj ni ncevis de Josef KONDOR en Neuwied, Germanio okcidenta. Li maltrafis la leterkeston, en kiu ni salutis lin en aprilo. Pri sia partopreno en packoncerto okazinta en Browley, Britio, por memori la germanajn kaj anglajn viktimojn de la germanaj flugatakoj super Londonon en 1940, li sendis detalan raporton. Same pri sia partopreno en la Universala Kongreso en Kubo. Tiujn dokumentojn kun la akompanaj fotoj ni sendas al CDELI por arkiva konservado. Inter aliaj dokumentoj tre interesa estas leterraporto de la ruso Sergej ANIKEJEV el Vladivostok. Ĝi raportas pri la spiritostato nun reganta en Sovetio.

Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. La venontan semajnon Claude kaj Andrée GACOND daŭrigos sian salutadon al la skribintoj. Ĝis reaŭdo !

*Kopirajto © Claude GACOND www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), januaro 2014*